## MILITPROPAGANDO (II)

de d-ro W. WINSEMIUS (Nederlando) [1].

### La „valor-analizo" de White pri la propagando de Hitler kaj Roosevelt [2].

White komencas sian artikolon atentigante pri tio, ke ekzistas pluraj multe disvastiĝintaj misopinioj pri la karaktero de la militpropagando de Hitler. Li resumas ĉi tiujn misopiniojn proksimume jene:

Daŭre apelaciadante al la plej malbonaj ecoj de la germanoj — ilia ŝovinismo, ilia nacia frenezo de persekutateco, ilia tradicia prusa militismo, iliaj plej primitivaj sentoj de malamo kaj ilia krueleco — Hitler preparis ilin psikologie por la plena neniigo de ilia (sia) propra libereco kaj por freneza provo konkeri la tutan mondon. Ĉe tio ĉi kun konsterna mezuro de malkaŝemo kaj ciniko li flankenŝovis ĉiujn normojn de humaneco kaj civilizo. Malkaŝe li gloradis la militon; laŭ lia propra diro li surgenue dankis la ĉielon kiam ekis la unua mondmilito, superfortata de la feliĉo ke al li estas donite vivi en tiu ĉi granda tempo (tiel oni legas en *„Mein Kampf"* (Mia Batalo)). Lia fincelo estis: la subjugigo de la tuta mondo, kaj en la lumo de ĉi tiu celo moralaj kaj humanecaj skrupuloj devis esti rigardataj kiel malhelpoj kiujn oni senindulge likvidu. La judoj estis senpardone neniigendaj; al la kristanismo — invento de la judoj — ne povis esti permesate adori dion superantan la Gvidanton *(Führer)*. Demokratio estas haladza marĉo: la reprezentantoj de la plimulto, t.e. de la stulto, nenion tiom malamas, kiom la superan spiriton, tiel li skribas en *„Mein Kampf"*. Eĉ vero kaj honoro estis eksplicite submetataj al la ĉionsuperrega celo: la konkerado de la mondo. Tiel li diras, ke en la grandeco de la mensogo jam troviĝas elemento de kredindeco, kaj ke la stulta amaso akceptas grandan mensogon pli facile ol malgrandan.

Estas vere, diras White, ke ĉi tiu populara opinio sendube prezentas preskaŭ perfektan bildon de tio kion Hitler *faris*, sed tre torditan bildon de tio kion li *diris*. Ĉi tio evidentiĝas, kiam oni submetas lian propagandon al preciza analizo. La problemo do fariĝas: kiel povis Hitler — aŭ, ĝenerale, kiel povas militpropagandisto — sukcesi igi sian publikon konduti en maniero tiel konflikta kun tio kio en normalaj cirkonstancoj estas rigardata kiel ĝusta kaj bona? Kompreneble ĉe tio ĉi la ekzemplo de Hitler estas sufiĉe ekstrema, sed ĝuste tial ĝi eble prezentas la plej bonan okazon klare vidi kiuj faktoroj ĉi tie ludas rolon.

Tial White aplikis valor-analizon al pluraj paroladoj de Hitler el la jaroj 1935-1939 (do, verdire, „propagando por militpreparo"), kaj, por komparo, li analizis plurajn paroladojn de Roosevelt el la sama periodo. Li antaŭsupozis — iom naive — ke la Roosevelta propagando — kontraste kun la Hitlera — ne estis „vera" militpropagando, kaj ke li do per ĉi tiu kompara analizo povus eltrovi kiuj diferencoj ekzistas inter propagando, ĝenerale, kaj militpropagando. Kompreneble ĉi tiu ideo ne estas tenebla; oni ja havas plenan rajton opinii ke Roosevelt estis homo pli honesta kaj pli pacama ol Hitler, sed ĉu Hitler private eble trovis militon ravaĵo,



malmulte aŭ neniom koncernas la temon. Temas nur pri tio, kiujn rimedojn li uzis por „frenezigi" homojn ĝenerale malamantajn militon, ĝis grado sufiĉa por tamen partopreni en ĝi, ĝuste kiel Roosevelt, kiu, vidante la militon pli kaj pli alproksimiĝanta, staris antaŭ la sama tasko, kaj do sendube ankaŭ devis fari militpropagandon. Kaj efektive montriĝos ke la militpropagandoj de Hitler kaj de Roosevelt intersimilis multrilate, kaj ke malkaŝa militglorado estas nur tre sporada en la publikaj eldiroj de Hitler, kaj praktike tute forestas post la „transpreno de la potenco".

**Kio estas „valor-analizo"?** — Valor-analizo laŭ la de White mem projektita metodo [3] estas aplikebla al tekstoj kiuj ne necese estu propagandkarakteraj. Oni eliras ĉe tio de la koncepto ke ĉiu esprimita aserto finfine estas ia konduto kaj do baziĝas sur valoroj kiuj en la teksto mem ofte eksplicite aŭ implicite esprimiĝas. Tiel en alia artikolo [4] White submetis al valor-analizo la aŭtobiografian romanon *„Black Boy"* de la negra verkisto Richard Wright por ekkoni la fundamentan kunfiguraĵon de valoroj de ĉi tiu aŭtoro, alivorte lian personon, (kompreneble kune kun la precipitaĵo de la valor-kunfiguraĵo de la tuta kulturgrupo, el kiu la verkisto devenas).

En la kazo de propagandaj tekstoj „valor-analizo" montras je kiuj valoroj la propagandisto apelacias, ekz. la aserto: „Neniu popolo faris por la paco pli ol la germana" apelacias, indiferente ĉu ĝi estas vera aŭ ne, je la valoro kiun oni atribuas al paco, se oni vidas ĝin en la tutaĵo de la Hitlera propagando.

„Valor-analizo" en la praktiko konsistas el tri etapoj: 1e. ĉie kie oni renkontas en la teksto valoron aŭ celon, eksplicite aŭ klare implicite formulitan, oni metas mallongigaĵon aŭ simbolon en la marĝenon; 2e. oni nombras ĉi tiujn simbolojn kaj tiel akiras por ĉiu valoro certan nombron; 3e. oni interpretas ĉi tiujn nombrajn rezultojn en la lumo de la ekzamenata propagando kiel tuto kaj ĉe tio speciale atentas pri eblaj motivoj por konscia trompo aŭ nekonscia sintrompo fare de la propagandisto.

Ĉi tio ŝajnas sufiĉe arbitra kaj nefidinda procedometodo, kiujn arbitron kaj nefidindon oni tamen klopodas forigi donante tre detalan kompendion en kiu troviĝas difinoj de ĉiuj rubrikigitaj valoroj, kaj kiu helpe de multe da difinoj kaj multe da ekzemploj donas laŭeble precizajn instrukciojn por la prilaboro. Ĉi tiel oni tamen atingas kontentigan gradon de fidindeco, kiu ankaŭ per statistikaj metodoj estas determinebla kaj kontrolebla.

**Intersimiloj inter Hitler kaj Roosevelt.** — Se oni supozas ke ambaŭ, Hitler kaj Roosevelt, estis majstroj en la arto de l' propagando, oni povas el ĉi tiuj intersimiloj fari konkludojn pri la ĝeneralaj kondiĉoj kiujn devas plenumi tia militpropagando por esti sukcesa. Ĉi tiu supozo, kompreneble, ne estas strikte pruvita, sed nenio kontraŭas al ĝia reteno kiel provizora hipotezo tiel longe, kiel neniu konvinke pruvis ke almenaŭ unu el ambaŭ estis sensukcesa.

La poste priparolotaj diferencoj do estos indikaj ne tiom pri la diferenco inter propagando ĝenerale kaj „vera" pormilita propagando, sed, pli ĝuste, respegulos la diferencojn inter la kulturaj valorkunfigurajoj, la politikaj kaj ekonomiaj situacioj en Hitlera Germanujo kaj Usono, kaj kompreneble ankaŭ la diferencojn personecajn inter Hitler kaj Roosevelt. Tiuj ĉi lastaj tamen eĉ ne tre gravas: finfine nur la tuta kultura kunfigurajo kaj la tuta politika situacio ebligis ke tia persono kia Hitler povis akiri la pozicion kiun li okupis, kaj la samo validas pri Roosevelt.

Kiom koncernas la similajojn, montriĝas unuavice ke ambaŭ forte emfazis siajn pacovolon kaj respekton antaŭ la konvencia moralo. Esprimoj de pacovolo, sinapogado sur moralaj valoroj, kiaj veramo, justo, kredo, neatakemo, amikeco, toleremo, grandanimeco, ktp., ĉe Hitler estas eĉ pli oftaj, ol ĉe Roosevelt; ĉe la unua ili sumiĝas al 38 %, ĉe la dua al 28,3 % de ĉiuj ekzamenitaj asertoj. Glorado de la milito ĉe Hitler tute mankas, same kiel ĉe Roosevelt. Ĉi tio do estas en evidenta malakordo kun la supre prezentita populara opinio pri la Hitlera propagando, nome, ke li „malkaŝe gloradis la militon" (kiu opinio baziĝas sur kelkaj elkuntekstigitaj citaĵoj el la periodo antaŭ 1930: ke li dankis la ĉielon surgenue, ekzemple, estis ne pro la eksplodo de la milito, sed pro la „fakto" ke la germana popolo fine ne plu toleris ke ofendaĉu ĝin ĝiaj malamikoj, kiuj „ĝin minacis en ĝia ekzisto mem"). Do ankaŭ nepre ne estas vere, ke ĉi tiu propagando apelacias al la „plej malaltaj instinktoj" de „la amaso", kiel oni tiel volonte kredas. Nek predikis Hitler malkaŝe „mondkonkeron", eĉ se oni povas, por argumenti tion, montri kelkajn malmultegajn citaĵojn de antaŭ 1930. Poste tiaj diroj jam ne troviĝas, sed estas trovataj tiaj, kia: „Al ĉiuj ŝtatoj kies teritorio limas la nian, ni nepre garantiis ke ni respektos iliajn limojn. Ĉi tio ne estas nur vortoj; ĝi estas nia plej sankta intenco." Multe citita verso el batalkanto: *„Denn heute gehört uns Deutschland, und morgen die ganze Welt"* („Ĉar hodiaŭ al ni apartenas Germanujo, kaj morgaŭ la tuta mondo") ne estu interpretata pli laŭlitere ol ekzemple: „Kaj la Internacio triumfos en tutmond'!" aŭ: *„Rule, Britannia, rule the waves"* („Regu, Britujo, regu la ondojn").

Estas vere ke Hitler kelkfoje per fortaj terminoj malaprobis demokration; ĉi tiaj malaproboj, tamen, konsistiĝas nur 0,3 % de liaj asertoj, dum en 1,6 % li laŭdas demokration — ne la vorton, sed la nocion, esprimitan kiel en „la volo de l' popolo" aŭ io tia. Ankaŭ ne estas vere ke li laŭdis la mensogon: je veramo li apelaciis en 6 % de siaj asertoj, dum la konata citaĵo ke granda mensogo estas pli facile kredata ol malgranda, devenas el insulta ŝvelparolo kontraŭ la judoj, kiujn li kulpigas esti mensogeguloj.

Tiel oni konstatas ke Hitler diras ke por Germanujo li deziras la samajn aferojn, kiel Roosevelt por Usono: paco, sekuro, sendependeco, libero, unueco, prospero, ktp. White do laŭe konkludas: „Ĉiuj propagandistoj devas apelacii vere aŭ false al la celoj kaj valorajoj de homoj, kaj la celoj kaj valorajoj de homoj estas, en rimarkinda mezuro, ĉie la samaj."

Dua intersimilo inter Hitler kaj Roosevelt estas, ke ambaŭ forte emfazas pri naciaj grandeco kaj potenco. Ĉi-tendencaj asertoj konsistiĝas ĉe



Hitler 12 %, ĉe Roosevelt 11 %; poste ni ankoraŭ iom konsideros la signifon de ĉi tio.

Fine ankoraŭ ekzistas tria intersimilo kiu estas iom alispeca, nome, ke ambaŭ, Roosevelt kaj Hitler, estis majstroj en la pentrado de akrekontrastaj nigro-blankobildoj, kiujn White resumas en jena formulo: „Ni estas la esenco de ĉio bona, kaj niaj malamikoj estas la enkarniĝaĵo de ĉio malbona."

**Diferencoj inter Hitler kaj Roosevelt.** — Ĉiu scias ke Hitler tre intense perpropagandis la germanojn por prepari ilin por milito. La analizo montras, kontraste kun tre disvastigita opinio, ke li faris ĉi tion apelaciante al ilia pacovolo kaj al ĝenerale akceptitaj moralaj valoroj, alivorte, ke li prezentis la deziratan konduton kaj la deziratajn konvinkojn kiel, en la donitaj cirkonstancoj, en la lumo de la menciitaj valoroj, la plej bonajn, la plej prirespondeblajn kaj adekvatajn. Ĉi tiu propagando tiurilate nur tiom diferencis de tiu de Roosevelt, ke li eĉ ankoraŭ pli emfazis ĉi tiujn valorojn. Cetere montriĝas ke ankaŭ la apelaciado al bildoj de nacia gloro, grando kaj potenco neniel estas specifa por la propagando de Hitler; ĉe Roosevelt tio troviĝas proksimume same ofte. Fine, ĉia propagando havas aspekton kiun oni kutimas nomi „informado", t.e. la disponigado de materialo de — veraj aŭ malveraj — „faktoj", de bildo de la realo, por observado, ekkono kaj ekscio fare de la publiko. Ĉi tiu materialo devas esti tiel elektita, ke la de la propagandisto dezirata konduto, sin trudas, en la lumo de la menciitaj valoroj kaj antaŭ ĉi tiu bildo de la realo, kiel la plej taŭgan aŭ eĉ kiel la solan eblan konduton. Alivorte, oni zorgu ke la publiko rigardu la „faktan" enhavon de la propagando kiel veran kaj efektivan. Apud vico da aliaj rimedoj la nigro-blanko-kontrasto povas havi ĉe tio gravan valoron; dank' al la tute ĝenerala ligiĝo al la propra grupo, la propra popolo, la propra registaro, jam ekzistas, denature, emo rigardi ĉion faratan de la propra grupo, la propra popolo, la propra registaro kiel nepre bonan, do kiel „blankon", kaj ĉion faratan de la efektiva, ebla aŭ imagata „malamiko", en la lumo de la samaj valoroj, kiel absolutan „nigron".

Ja estas klare, ke militpropagandisto devas projekti tre difinitan bildon de la fakta realo por prezenti la konduton, deziratan en okazo de milito, tiel „blanka" kiel estas bezonate. Kaj ĉi tiu bildo de la realo devas varii laŭ tio, kiel la grupoj al kiuj la propagando direktiĝas, karakteriziĝas de malsamaj valorsistemoj kaj troviĝas en malsamaj faktaj (politikaj, ekonomiaj, kulturaj, ktp.) situacioj. Ĝuste ĉitiurilate la de White trovitaj karakterizaj diferencoj inter la propagandosistemoj de Hitler kaj Roosevelt povas doni gravajn indikojn.

Kiel plej gravan diferencon White trovis, ke Hitler, multe pli ol Roosevelt, esprimis *ideojn de persekutateco*. En la Hitlera propagando ripete montriĝas la fikcio, ke Germanujo estas ĉirkaŭita de organizitaj „judo-plutokrati-bolŝevismaj" konspiroj celantaj la neniigon de la vivo kaj la ekzisto mem de la germana popolo, kaj finfine eĉ la pereon de la tuta homaro. Ĉi tiuj ideoj de

persekutiĝo kune donas la impreson de tre sistemigita paranojeca mondo de fikcioj, kaj, certasence, tio konsistigas ĝian forton. Ĉar, kiel ĉiuj paranojecaj sistemoj, ankaŭ ĉi tiu estas konstruita laŭ fera logiko; sufiĉas ke oni akceptu kelkajn „fundamentajn aksiomojn" kiel faktojn. S e Germanujo efektive estus ĉirkaŭita de perfidaj malamikoj, s e efektive ekzistus tutmonda komploto kontraŭ Germanujo en kiu partoprenus ĉiuj judoj, s e efektive la ĉirkaŭaj landoj estus preparataj kiel bazoj por atakoj kontraŭ la germana teritorio, kaj s e, ĉe ĉio ĉi tio, pereo minacus la ekziston mem de Germanujo, eĉ de la tuta mondo kaj la homa kulturo, do estus nur logike kaj necese ke Germanujo estu armegita, ekonomie sendependa, politike unuanima, posedata de spirito de *„Heldentum"* (heroeco), ke oni neniigu la militpreparojn de la malamikoj en la ĉirkaŭaj landoj, kaj senindulge ekstermu la judojn kiel fikomplotistojn. La militpreparado kiel tuto, sub tiu aspekto, fariĝas bedaŭrinda, sed nepre necesa rimedo por finfine atingi la deziratajn pacon, juston, prosperon, feliĉon, k.t.p. Nuntempe ni vidas ke tiel la rusa, kiel la kontraŭrusa propagando, kun la necesaj adaptoj, kantas precize la saman kanton: la „judoj" nun fariĝis, ekz. „la agentoj de Moskvo" „Wallstreet-imperiistoj", ktp.; nek mankas la mondampleksaj konspiroj, dum ĉiam estas troveblaj „faktoj", (respektive estas prisilenteblaj aliaj faktoj), kiuj devas helpi pruvi la efektivecon de tiaj ĉi fikciaj sistemoj kaj daŭre apogi ilin.

La demando nun tamen estas, ĉu vere tiaj sistemoj estas nur fikciaj sistemoj. Tia amasa fikciosistemo ja iel similas imaginaran nombron: multiplikante du tiajn, unu per la alia, jen oni ekhavas realan grandon, eĉ se ĉiam nur negativan. Se „la rusoj" agas kvazaŭ ili estas permorte minacataj de iu „Wallstreet"-konspiristaro — eĉ se tia tute ne ekzistas —, kaj la „liberaj popoloj" lasas ke ilia agado estas determinata de la imagataj konspiroj de „Moskvo" kaj la „Kominformo", do el tio povas finfine rezulti tre reala milito kun ĉiuj apartenaj detruadoj. Kaj estas ja terura perspektivo se oni pripensas kiel la mondon tiamaniere povos pereigi la plenaj absurdo kaj nerealo. Tial, jam sole por sin savi de ĉi tiu timo, ĉi tiu teruro, ni nepre antaŭinklinas akcepti tamen de unu el la fikcisistemoj, kaj do kompreneble de tiu de la propra grupo, almenaŭ iujn fundamentajn „faktojn" kiel realajn kaj nerefuteblajn. Ĝuste ĉi tiu timo antaŭ la absurda pereo, antaŭ la sensenca detruiĝo minacas fine fari el ni sendefendajn viktimojn de militpropagando kaj igi „superpartiecon" finfine proekzistadan neeblaĵon. Ni ne povas eviti vidi la militon en Koreujo kiel klaregan simptomon de komunista „atakemo", tiel same kiel la komunistoj ne povas ne trovi en ĝi la nerefuteblan pruvon de usona „atakemo". Tria eblo ne ekzistas — krom eble por la koreoj kiuj pereaĉas pro ĝi.

En la kazo de Hitlera Germanujo W h i t e ankoraŭ pli klarigas tion. Oni ne forgesu, ke, fine, la malvenko en la unua mondmilito, la Versaja traktato, la perdo de la germanaj kolonioj, ktp. estis disponeblaj kiel tiom da faktoj kiuj povis doni al la Hitlera fikcisistemo la ŝajnon de efektiveco, kaj ke, por plia apogo, oni povis elpensi ankoraŭ multajn aliajn faktojn, kiuj ĉiuj ja ie havis realan bazon. Ankaŭ oni ne forgesu, ke nur ĉ i t i u j „faktoj" (t.e. ĉi tiuj mensogoj, duonveroj, torditaj interpretoj, ktp.) prezentiĝis en la gazetoj, la radioprogramoj, per la filmoj, ktp., kaj ke la efektivajn objektivajn faktojn oni simple ne allasis; la fikcisistemo de la nacisma ideologio estis praktike la sola prezentata al la germana popolo kiel bildo de la realo. En la fundamenta valorsistemo oni bezonis nenion ŝanĝi; sufiĉis plene falsi la bildon de la realo. „La germanoj volis pacon, ...... sed Hitler pentris bildon", kiel diris W h i t e.



Kial W h i t e ne aŭ multe malpli trovis tiajn ideojn de persekutateco ĉe R o o s e v e l t? Oni povus respondi: ĉar White estas usonano, kaj tial, mem sub la influo de ĉi tiu propagando, ne vidas ĝian fikciecon. Sed tiel tamen ne estas, eĉ se oni povas konjekti ke White ne estas tute senantaŭjuĝa. Ekzistas ja ankoraŭ kelkaj aliaj kaŭzoj kial la propagando de Roosevelt povis esti tiel relative libera de paranojecaj elementoj. Unuavice estis disponeblaj multe malpli da faktoj kiuj povis servi kiel bazo por fikcio de persekutateco: nenia perdita milito, nenia manko de „vivospaco", nenia geografia proksimeco de imagataj aŭ efektivaj malamikoj, ktp. Duavice: la konduto de la nacistoj mem estis, por tiel diri, jam *„gefundenes Fressen"* („trovita manĝaĵo", t.e. tre bonvena, preta materialo) por kontraŭpropagando; multe malpli necesis konstrui fikcisistemon. W h i t e rimark(ig)as ke denuncoj pri germana „komploto" celanta mondkonkeron ĉe Roosevelt pli kaj pli oftiĝis, ju pli la milito iĝis koncernanta Usonon; sed kiom pli da motivo por tiaj denuncoj donis la nacistoj ol la nedecidemaj, de timo kaptitaj registaroj de la aliaj eŭropaj landoj antaŭ 1939! Ĉe Roosevelt oni tial ne trovas la tipan, psike nenormalan, paranojecan „aromon", tiel klare ĉeestan en la deklaroj de Hitler. Eble ĉi tio trovas partan klarigon ankaŭ en tio, ke en kulturo kun fortaj demokratiaj tradicioj kaj ideologio ne tre eblas antaŭmeti al la publiko unu solan, tre sistemigitan, tutisman fikcisistemon. Ĉi-rilate la demokratio diferencas de la diktatoreco, kiel la normala, spirite sana homo de la paranojulo. Kie oni alte estimas la liberecon en la elekto de konvinkoj kaj mondkoncepto, tie ne estas loko por mallarĝiĝo de konscio kaj por la malvasteco de unu sola sistemigita mondkoncepto kiu lasas ebla nur unu solan kondutkunfiguraĵon.

Aliajn diferencojn inter la valorsistemoj de la germana kaj usona kulturoj ni povas nur tuŝeti ĉi tie: ke H i t l e r pli emfazis pri forto, grandfaroj, venko, ktp. (34,8 %; Roosevelt 15,2 %) kaj R o o s e v e l t pli pri ekonomiaj valoroj, kiaj prospero, laboro, propraĵo, ktp. (27,7 %; Hitler 10,8 %), konjekteble respondas al pli alta estimo antaŭ la „heroa homo" en la germana, kaj de la „ekonomia homo" en la usona kulturo (kio kiel klarigo, kompreneble, ne estas grandsignifa; sed tie ĉi ne estas la propra loko por tion diskuti). Plue, ĉe Roosevelt oni trovas multe pli grandan proporcion da „celo-rimedo-analizo" (17 %, kompare kun 6 % ĉe Hitler), t.e. da inteligenta motivado kial certa konduto estas dezirinda kiel rimedo por atingi pli malproksiman celon. W h i t e ne malsprite rimarkas ke eble ĉi t i o respegulas la diferencon inter la diktatoro pensanta p o r, kaj la demokratia gvidanto pensanta k u n sia popolo.

Resumante ni vidas, laŭ la de White analizita ekzemplo, ke militpropagando estas sistemo de asertoj, kiu apogiĝas sur la de la publiko ĝenerale akceptitaj valoroj: la reganta moralo, la fundamentaj strebadoj kaj deziroj de la publiko, ĝia grupa ideologio kaj speciale la konscio aparteni al la forta, potenca, sana, mallonge, al la ĉiel supera grupo (oni pensu nur pri la rasomito!); per tio la propagando kvazaŭ aŭtomate ricevas sian karakterizan nigro-blanko-karakteron. La enhavo de la propagandaj asertoj prezentas al la publiko bildon de la realo, kies ĝustecon ĝi grandparte ne povas kontroli, sed kiu de ĉiuj flankoj estas trudata al ĝi, kaj en ekstremaj kazoj eĉ estas la sola laŭ kiu ĝi povas formi siajn konvinkojn.

Ĉi tiu bildo de la mondo povas, laŭ objektiva vidpunkto, esti treege falsita kaj tordita, pro kio la propagando ofte ricevas la karakteron de fikcisistemo, tuj kiam disponeblas eĉ nur kelkaj faktoj aŭ kvazaŭfaktoj kun la ŝajno de nerefutebleco, kiuj povas servi kiel bazo por tia fikcisistemo. Kie sole tia fikcisistemo estas disponebla kiel materialo el kiu la publiko povas formi al si siajn opiniojn pri la realo, ĉi tiu publiko ankaŭ akceptos ĝin kiel efektivan, dum ĉion kio ne akordas kun tio (inklude la veron), ĝi rigardos kiel fikcion kaj mensogojn. Se la propagandata bildo de la realo estas tia, ke surbaze de la reganta valorosistemo la konduto dezirata de la militpropagandisto ne povas ne aperi kiel la plej bona aŭ kiel la sola ĝusta en ĉi tiu „realo", do la propagando atingis sian celon kaj la publiko senmanke tiel kondutos kaj havos tiujn konvinkojn.

La kondiĉoj kiujn devas plenumi propagando por esti efika, do estas:

1e. ĝi devas adaptiĝi al kaj apogiĝi sur la reganta valorosistemo, kaj

2e. el la tuto de la disponeblaj faktoj ĝi devas konstrui bildon de la realo, en kiu la dezirata konduto aperas kiel la ĝusta kaj bona konduto en la lumo de la sub 1e menciitaj valoroj. Ĉe tio oni forigu ĉiujn faktojn kiuj konfliktas kun ĉi tiu bildo, aŭ oni „prilaboru" ilin tiel, ke ili akordiĝu, kaj por kompletigo oni eventuale ankoraŭ aldonu nombron da kvazaŭfaktoj. Ĉi tiu mondbildo povas enhavi grandan proporcion da mensogoj kaj sensencaĵoj, sed estu libera de tio, kion oni povus nomi „ekzistadumaj absurdaĵoj". Alivorte: ĝi ne konfliktu kun la fundamentaj karakterizaĵoj de la „estado en la mondo" de la homo, de la maniero en kiu li spertas sin en sia mondo, kaj kun la kontrolaj faktoj de lia propra plej proksima ĉirkaŭaĵo. Neniu propagando, ekz., iam povos insisti ke duoble du estas kvin, ke ventrodoloro kaj naŭziĝo estas karakterizaĵoj de alta grado de korpa bonfarto, aŭ ke estas nedirebla feliĉo esti bombdetruata. Jen la kaŭzo kial la nacisma propagandosistemo ne povis ne kolapsi tuj kiam la invado de la aliancaj armeoj montris la asertitan nevenkeblecon mensogita: la fikcisistemo ne povis resti staranta vid-al-vide kun tia superega kaj proprakorpe spertata potenco de la realo [5]) .

Ankaŭ propagando kiu ne plenumas la unuan kondiĉon, ne povas esti sukcesa kaj povas en certaj cirkonstancoj eĉ havi efikon rekte kontraŭan al la celata. Pro la ŝato kiun granda parto de la nederlanda popolo havas por certaj nutraĵoj, oni ne povos konvinki ĉi tiun publikon ke senkremigita lakto



estas „pli bona" ol plena lakto, „kvankam", aŭ eĉ „ĉar" ĝi estas sengrasa, sed principe tute eblas kredigi ĝin ke senkremigita lakto enhavas pli da graso ol plena lakto, kompreneble: kondiĉe ke oni celtrafe falsu la bildon de la realo, nome: zorge malebligu la akiron de scio pri la procedo de ĝia preparo, pri la signifo de surnaĝantaj grasrondaĵoj, ktp. (kaj nomu ĝin ne *senkremigita*, sed, ekzemple, *pligrasigita* aŭ *kremumita* lakto). Kaj tamen, dum la unue menciita aserto povus esti duona aŭ kvarona vero, la dua estas evidenta mensogo, kiu tamen pli bone kalkulas kun la ekzistanta valorosistemo. Kaj jen alia ekzemplo: la devizo „kun Germanujo por unuigita Eŭropo" povis trovi en Nederlando nur tre malmulte da resono, ĉar en Nederlando oni taksis la nocion „Germanujo" ĝuste tiel negative, kiel trans la orienta nederlanda limo oni taksis ĝin pozitive.

Kiel ekzemplo de mala efiko servu la jeno: kiam en 1943 konatiĝis ke en Surinamon (tiam nederlanda kolonio) alvenis usonaj trupoj, tuj la „konformigita" gazetaro ektamtamis pri ĉi tiu „atenco kontraŭ nia sendependeco", kaj iutage ĉie aperis afiŝoj kiuj montris nur pendigilan maŝon faritan el angla kaj usona flagoj, kun la subskribaĵo „Kiu sekvos?" Montriĝis en la postaj tagoj ke ĉie desegniĝis la vizaĝo de Hitler en tiu maŝo, aŭ ke lia nomo skribiĝis kiel respondo sub la demando. La nederlanda popolo tre kontentis pri ĉi tiu sponta reago. Kvankam oni de la germana flanko faris ankaŭ multe pli ruzan propagandon, tamen oni tro emis pretervidi tiutempe, ke ekzistas, krom multaj aliaj diferencoj, unu tre fundamenta diferenco inter la germana valorkunfiguraĵo kaj tiu de la okupitaj malamikaj teritorioj, nome ke tie ĉio germana estas taksata ĝuste kiel „la malamiko", kiel „nigro" kaj nepra malbono, kaj ĉiuj asertoj de la germana flanko kiel „propagandaj mensogoj". Tiel en Amsterdamo en 1944 neniu volis kredi, ke minacas tifoida epidemio pro la konsumado de kaŝe aĉetitaj infektitaj fumaĵitaj angiloj; oni konjektis ke ĉi tiu informo, kiu efektive estis vera, devenis de la germanoj. Ĉi tio kompreneble ne nuligas la fakton, ke ĉie ja troviĝis malplimultoj, kiuj, konsiderante aliajn valorojn — ekz. pro admiro antaŭ la forto aŭ la ideologio de la germanoj, pro ekonomiaj avantaĝoj, pro venĝemo aŭ kontraŭstaro kontraŭ la antaŭmilitaj gvidaj rondoj, ktp. — tamen fariĝis pli aŭ malpli germanamikaj.

---

[1]) Ĉi tiu artikolo aperis en la nederlanda lingvo en la organo de la Nederlanda Asocio de Sciencistoj *„Wetenschap en Samenleving"* (Scienco kaj Socio), eldonaĵo de van Holkema & Warendorf N.V., Amsterdam, en N-ro 5a de la 6a jarkolekto, Majo 1952, sur paĝoj 278-283. Ĝin tradukis kun permeso la redaktoro de *Scienca Revuo*.

[2]) Ralph K. White, *Hitler, Roosevelt and the Nature of War Propaganda* (J. Abnormal and Social Psychol. **44**, 1949, 157-174).

[3]) Ralph K. White, *Value Analysis: A Quantitative Method for Describing Qualitative Data*, (J. Soc. Psychol. **19**, 1944, 351-358).

[4]) Ralph K. White, *Black Boy: A Value Analysis* (J. Abn. and Social Psychol. **42**, 1947, 440-461).

[5]) Vidu pri tio, ekz., H. L. Ansbacher, *Attitudes of German Prisoners of War, a Study of the Dynamics of National-Socialistic Followership*, (Psychol. Monographs, Am. Psychol. Association, Nr. 288, 1948; Vol. **62** 1).